8-a JARO, N-o 366/367



LEIPZIG, 8. / 10. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerñner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

LA FUNDAMENTO DE L'KAPITALISMO ŜANCELIĜAS.

La ekonomia krizo tutmonda, kiu jam de multaj monatoj furiozas tra la kapitalisma mondo, ŝajnas esti atinginta akutan staton, kiel vundo, kiu pusas, ĵetas en febroskuojn la malsanulon k fine kondukas al paroksismo.

Ĉiujn okazojn de l'laŭ politika k ekonomia vidpunkto tiom okazoriĉa monato septembro 1931 superregas per la grado de sia gravo k profundo sendube la akutiĝinta krizo de l'brita kapitalismo.

Efektive, la angla funto sterlinga estis ĝis nun taksata kiel unu el la plej solidaj k neŝanceleblaj monvaloroj en la tuta mondo, k oni povas kompreni la miregon k konsterniĝon de la „interesitaj rondoj", la kapitalistaro en ĉiuj landoj, kiam subite ŝanceliĝis tiu ĉi fidinda valuto, kiam ĝi estis per dekreto metata ekster la leĝa ora bazo k falis same tiel mizere, kiel iam falis aliaj valutoj, sub la bankrotosignoj de l'ŝtata ekonomio k nekovrita buĝeto.

La konsterniĝo trans la limoj de l'Brita imperio estis tiom pli profunda, ke multaj kapitalposedantoj aŭ prunteprenintoj de angla valuto en la diversaj eŭropaj landoj estis senpere trafitaj per la valorperdo de l'angla funto. Ĉe la ekzemplo de tiu ĉi brita financa krizo ni povas tre bone observi, kiel interligitaj k interdependaj estas la kapitalistaj interesoj de l' diversaj ŝtatoj, kiel materie dependas la unu de l'alia: kiel absurda sekve estas en tiu ĉi epoko la naciisma spiritostato, laŭ kiu „savi la propran landon" el bankroto signifas la plej sanktan homan devon. Se tiuj vortoj el la buŝo de demagogaj politikistoj sonas nature k kompreneble, pli malkompreneble estas, ke ili estas akceptataj ankoraŭ de grandaj laboristaj amasoj, bedaŭrinde, kiel sincera parolo. Tiuj vortoj pri la „savo de l'propra lando antaŭ ĉio", aŭdataj el la buŝoj de Makdonald k Snodn (Snowden) – verŝajne tio estas ilia sincera sento k opinio – karakterizas la spiriton de tiaj personoj, kiuj dum longa tempo povis gvidi la laboristaron de granda lando.

La konsterniĝo ĉe la kapitalistaro pri la anglaj okazoj estis kompleta. Ni vidis sub la unua impreso de l'tiea financkatastrofo sin fermi preskaŭ ĉiujn eŭropajn borsojn, ni vidis la anglan valuton kurzfalanta, k ni vidis la malesperajn klopodojn de l'respondecaj registaraj personoj, inter ili la transkurintoj al la burĝa flanko: Makdonald k Snodn, trovi elirejon el tiu baraktado.



La unua kvazaŭ instinkta movo de l'kapitalistaj institucioj ĉiulandaj, la aŭtomata fermo de l'borsoj montras al ni, kiel sentemaj estas ĉi tiuj institucioj, k kiel interligitaj iliaj ekonomiaj interesoj, kiel preskaŭ tujaj la reefikoj en aliaj landoj, precipe en tiaj, kiuj havas apogon ĉe la brita kapitalismo, kiel Italio k Hungario. Sed eĉ la burĝstata Holando reagis per fermo de l' Amsterdama borso; Svisio ne plu notis la anglan valuton. Kaj pli malbonfarta ekonomie ol ĉi tiuj, Germanio tuj profitis la okazon por ree fermi siajn ĵus malfermitajn borsojn. La timego, ke la malsano de l'brita financa aparato transsaltos al la ĝis nun ne tiom tuŝitaj landoj, estas treege granda. Kaj por tion konstati, kiel oni timas la sekvojn de l'brita malsano por la tuta sistemo, oni nur bezonas preni en la manon iujn gravajn burĝajn ĵurnalojn.

Ni citu el unu el la plej karakterizaj k burĝe klaskonsciaj. En ĉefartikolo de la franca „La Tempo" (Le Temps) de 22. sept. ni legas jenajn konsiderojn: „. . . La plej grava eraro, kiun oni povus fari en tiu ĉi horo, – k ne nur en Anglio – estas sin fordoni al la pesimismo k supozi, ke la kredito de Granda Britio estas nekuraceble kompromitita. Temas ĉi tie ne nur pri la savo de Anglio, sed pri la savo de l'tuta mondo. Se financa ruiniĝo de potenco kiel Britio povus okazi – eventualo, kiu estas ekster ĉiuj raciaj antaŭvidoj, – ĉiuj nacioj estus trafataj reefike per tio, ĉiuj popoloj suferus rekte aŭ nerekte ĝiajn efikojn. Neniam eble la solidaro kreiĝinta inter la nacioj per la kondiĉoj mem de la moderna vivo aperis kiel pli certa realo. Ĉiuj argumentoj de politika k sentimenta fako neniiĝas ĉi tie antaŭ la urĝega neceso de intima kunagado por la bono de ĉiuj. . . "

Malgraŭ kelkaj trankviligaj vortoj oni sentas klare la maltrankvilon k timojn, kiuj ekkaptis la burĝaron. Kaj oni atentu, ke Francio estas lando, kie la kampkulturo k industrio proksimume ekvilibriĝas, k sekve ekonomie

iom pli memstara kompare kun aliaj eŭropaj landoj. Tial ĝi estas malpli intense vundebla ol aliaj ŝtatoj, kiuj rekte dependas de la bonfarto de la brita valuto. Ankaŭ pro tio ke ĝia ŝtata banko estas apud la usona tiu, kiu tenas nuntempe plej multe da oro. Tamen ankaŭ tiu organo de l'franca grandburĝaro parolas tiel, k ĝi ne forgesas samtempe insulti la laboristaron, skribante en respondo al sindemando, kial malgraŭ la starigo de nacia registaro k ĉiuj oferoj k redukto de elspezoj Britio ne sukcesis haltigi la krizon k krei alian atmosferon: „Oni povas klarigi tion nur per la nekomprenemo de l'amasoj k ankaŭ de tiuj, kiuj la propran intereson starigas antaŭ la ĝenerala intereso, ne konsiderante, ke ĉiu aparta intereso estas endanĝerigita, kiam la ĝenerala intereso estas trafita.“ –

Kaj kiel aspektas la situacio ekster Britio? *Usono* ne scias, kiel solvi la problemon de l'troproduktado k de l' senlaboreco; *Germanio*, kies ekonomio malsanegas depost la milito k kie la senlaboreco minacas atingi neviditan gradon en ĉi venonta vintro, similas al dronanto; *Aŭstrio*, kiu ne havas ekonomian memstarecon, travivas saman periodon de mizerego kiel Germanio; *Hungario* trapasas registaran k ekonomian krizon, sen ke la laboristaro posedas la necesan forton por likvidi la diktatorecon; en *Polio* la situacio de l'laboristaro estas senespere malbonega; *Italio* estas forte tuŝita en sia ekonomia vivo per la kurzfalo de l' angla funto; la faŝista reĝimo ne povas malhelpi manifestaciojn de senlaboruloj; ktp. Nur *Sovetio* faras escepton; ĝi ne havas senlaborecon k efektivigas celkonscie la konstruadon de sia laŭplana ekonomio.

Vere, en la monda skalo ŝanceliĝas la kapitalisma fundamento. Kaj nun la eminentaj reprezentantoj de tiu ĉi sistemo febre serĉas elirejon el tiu ĉi situacio, savilon por sia regado. Usono k Francio, kiel posedantoj de ortrezoroj, estas citataj kiel savontoj. Oni apelacias al ilia bonvolemo. Oni preparas rapideme la refirmiĝon de l'ŝanceliĝanta konstruo. Nenia dubo pri tio.

La demando estas nun, ĉu la tutmonda laboristaro permesos al ili tion fari, ĉu ĝi permesos al la rabistoj plue teni sian rabaĵon, ĉu ĝi permesos, ke la dronantoj kaptu la savilon k sin elsavu: Aŭ ĉu ĝi intervenos per sia tuta forto k agos tiel, ke la kapitalismo ricevu la lastan puŝon, kiu pereigos ĝin en la marĉo, kiun ĝi mem kreis k el kiu ĝi povis ĉiam denove leviĝi ĝis nun nur dank' al la bonvola apogo de l'laboristaro, sur kies ŝultroj kurbegitaj sidis la parazitaro k premegis per maloportuna malracia „raciigo“, senlaborigo, impostegoj, salajr-malaltigoj ktp. Se en tiu ĉi horo la laboristaro ne estus infektita per burĝeca idearo k

ATENTIGO!

Kiel niaj legantoj jam povas konstati, ĉi tiu numero aperas en amplekso de 12 paĝoj, kiel duobla n-o. La venonta numero aperos nur post du semajnoj. Pli precizajn klarigojn pri tiu paŝo oni povos legi en la venonta n-o.

tiom malfortigita per la fratbatalo, la disputoj k interbataloj en la propra tendaro, – ni estas konvinkitaj, ke ĝi povus organizi tiun potencan kontraŭstaron al la provoj de l'kapitalistaro sin savi per la helpo de l'proletaro, kiu transformiĝante en atakon frakasus la tutan sistemon de l'ekspluatantoj. Makdonald k similuloj tiam vane klopodus savi la burĝaron, ĉar la *unuigita proletaro*, ne estante movado de malplimulto, sed de granda plimulto, certigus al si la nepran venkon super la ŝanceliĝanta malnova sistemo.

N. Bartelmes.

LA FAŜISTA RIBELPROVO EN AŬSTRIO.

La iama gloro de l'aŭstria burĝaro, la „Hejmdefendo“ (ligo de l'aŭstriaj faŝistoj), kreita sub aktiva kunlaboro de eminentaj burĝaj politikistoj por detrui la malamatan „aŭstro-marksismon“, provis starigi la faŝistan diktatorecon per ribelprovo en la nokto de sabato, la 12-a ĝis dimanĉo, la 13-a de septembro.

Ni memoru tiuokaze pri la situacio en la jaro 1927. La registaro de l'prelato Sajpel (Seipel), sub kies protekado la Hejmdefendo fariĝis la privata armeo de la aŭstriaj kapitalistoj, regis en Aŭstrio. La gvidantoj de la faŝista movado penis kunigi la burĝaron kontraŭ la „internan malamikon de la germana nacieco“, kontraŭ la marksisman laboristaron, kiu dum tiu tempo havis bonajn ŝancojn por akiri la potencon en la ŝtato. Sajpel havigis al la faŝistoj financan subtenon de la bankoj, industri-kapitanoj k grandbienuloj, k entuziasme li akcelis la faŝistajn murdist-bandojn. La hejmdefendmovado rapide kreskis post la 15-a de julio 1927, kiam la Viena proletaro ribelis kontraŭ la malkondamno de murdintoj al laboristoj. En aŭtuno de 1929 la faŝista movado atingis la kulminan punkton. Polic-prezidanto Ŝober (Schober), depost la 15-a de julio 1927 tiel amata de la Viena laboristaro kiel Cergibel (Zörgiebel) depost la unua de majo 1929 en Berlino, tiam transprenis la registaron por realigi konstitucian reformprojekton, kiu celis forigi la influon de la socialdemokratio. Sed por modifi la konstitucion laŭleĝe necesas plimulto de du trionoj en la parlamento, kiu sen la voĉoj de la socialdemokrataj deputitoj ne estis atingebla. La Hejmdefendo dum septembro 1929 ekminacis per perfortapliko, k ĝiaj gvidantoj predikis la „marŝon al Vieno“ por devigi la laboristaron akcepti la proponitan konstitucireformon. Post plursemajnaj diskutoj k konferencoj inter socialdemokratoj k burĝoj, dum kiuj la plej esencaj k plej malicaj difinoj estis forigitaj, la socialdemokratoj devis voĉdoni por la modifita projekto, kiu tamen enhavis paragrafojn treege malfavorajn al la laboristaro.

Depost tiu tempo komenciĝas la rapida dissolviĝo de la Hejmdefendo. La sukceso de iliaj postuloj ne estis tre grava, la entreprenistoj estis malkontentaj pro la laŭ sia opinio nesufiĉa senrajtigo al la laboristaro. Subite la subvencioj ĉesis flui en la kasojn de la Hejmdefendo, ĝia anaro ne plu ricevis monon k tial amase ĝi forkuris.

Aŭtuno de 1930. La parlamento, kies funkciperiodo estis ĉesinta, estis novelektenda. La Hejmdefendo nun fondis politikan partion por kolekti la voĉojn de la homoj malkontentaj pri la ekzistantaj partioj demokrataj. „Princo“ Starhemberg, la tiama gvidanto de la Hejmdefendo, eniris la registaron kiel ministro por internaj aferoj. Kiel ĉefo de la ŝtataj plenum-organoj li ordonis malarmi la defendorganizon de la aŭstria laboristaro, la respublikan ŝirmligon. La policistoj k soldatoj enpenetris la laboristajn hejmojn, parti-domojn k privatloĝejojn de socialdemokrataj funkciuloj. La sukceso de tiu ĉi armilserĉado estis absolute sensignifa k tio verŝajne ankaŭ estis la sola kaŭzo, kial la faŝistoj ne uzis tiun ĉi ĝis nun plej favoran momenton por starigi sian diktatorecon. Post la baloto la sensignifeco de la Hejmdefendo klare evidentiĝis: inter 165 elektitaj deputitoj estis 7 Hejmdefendanoj.

Preskaŭ la faŝistoj ne estis plu atentataj, ĝis dimanĉon, la 13-an de septembro, ili provis renversi la respublikan konstitucion per ribelprovo („puĉo“); sed ĉi tiu ŝtatperfida entrepreno mizere fiaskis, antaŭ ĉio pro la fera defendvolo de la revolucia laboristaro. La ribelprovo preskaŭ nur restis limigita al Stirio[1], de kie la faŝistaj banditoj intencis konkeri la tutan Aŭstrion. En Stirio la tuta ŝtata aparato estas infektita per la faŝista bacilo, k tial la Hejmdefendo prave kalkulis je pasiva k eĉ aktiva subteno de la landa k distrikta registaroj. Ili ankaŭ ne eraris. La registaro sciigis pri la okazaĵoj noktomeze k la militistaro alvenis je la 3-a posttagmeze! La ofensivo de la ŝtataj plenum-organoj okazis rimarkinde malrapide k

[1] Aŭstrio konsistas el 9 federaci-landoj: Supra Aŭstrio, Malsupra Aŭstrio, Vieno, Burgenlando, Stirio, Karintio, Vorarlbergo, Salcburgo, Tirolio.

sub tiel strangaj cirkonstancoj, ke la grave armitaj hejmdefenduloj ĝustatempe povis forkuri k kaŝi la armilojn. En Leoben (Stirio) ekzemple oni observis, kiam la ĝendarmoj alvenis, ke la stratpostenantoj de l'faŝistoj donis la karabenojn al siaj kunuloj, kiuj ilin portis al la ĉefstabejo. Poste la armiloj estis ŝarĝataj sur veturpretajn aŭtomobilojn, kiuj forveturis tra la malantaŭa pordego, kiam la ĝendarmoj aperis antaŭ la stabejo. Sed antaŭe la trupestro de la ĝendarmaro amike salutis la gvidanton de la hejmdefenduloj per kamaradeca manpremo.

La ribelintoj estis okupantaj distriktregistarejojn k arestis distriktestrojn, urbestrojn k laboristajn funkciulojn. En la stratoj estis disdonitaj k afiŝitaj flugfolioj kun alvoko al la „Popolo de Aŭstrio" k la provizora konstitucio faŝista, subskribita de la faŝista ĉefo k gvidanto de la ribelprovo, d-o Pfrimer (Pfriemer). En Karpfenberg la faŝistaj krimuloj kuratakis la laboristan hejmon k mortpafis 2 nearmitajn laboristojn k tri aliajn K-dojn ili grave vundis.

Ĝis la 13-a vespere la opereta ribelo komplete estis likvidita, la gvidantoj grandparte arestitaj. D-o Pfrimer, kiu jam revis pri la „transpreno de la ŝtata potenco", kuraĝe forkuris al Jugoslavio. Kvankam la registaro promesis plej severan punon de la kulpuloj, la laboristaro ne fidas al tiu promeso k ĝi agas bone, se ĝi atenteme direktas la rigardon al la venontaj okazoj.

J. B., Linz-ano n-o 17245.

EL LATVIO.

Anstataŭ preĝado — lernado de latva lingvo.

En Latvio — certe ankaŭ en aliaj landoj — oni devis antaŭ 30 jaroj multege preĝadi. Estis la plej grava fako en lernejoj — la preĝado. Nuntempe la homoj estas pli kleraj. La preĝado k lernado el la biblio ne estas plu necesa, k tio nur okazas oficiale laŭ volo. Sed, por ke al la gelernantoj k aliaj homoj ne manku laboro, ni havas multe da „kleregaj" lingvaj profesoroj. Ĉiutage ili ŝanĝas la latvan lingvon k ĉiu laŭ sia gusto. Famekonata tiurilate estas la profesoro Endzelius, sed ankaŭ profesoroj Ŝmit k Bleze distingiĝas. Ĉiutage ankaŭ la lernantoj devas lerni denove ĝuste skribi latve. Ĉiutage ankaŭ la maturaj homoj devas denove lerni la korektan skribadon.

Kompreneble estas, ke ĉiuj estas malkontentaj pri la profesoroj nomitaj, k tiuj lingvistoj pruvas, ke la profesoro Endzelius mem ne skribas korekte laŭ sia elpensita ortografio. Efektive tio rilatas la ortografion, ĉar ankaŭ la ortografion oni ĉiutage ŝanĝas, ne nur la vortojn. Oni supozas, ke preskaŭ 80% el la latva intelektularo skribas malkorekte!

Kiam la gelernantoj estas finstudintaj en la mezlernejo k volas fariĝi altlernejaj studentoj, ili devas ankoraŭ lerni tre multe preĝi — ho, pardonu: ellerni latvan lingvon. Ĉar ĝenerale estas tro multaj aspirantoj, okazas kurs-ekzamenoj, k ordinare pro la ekzameno en la latva lingvo 50% el la aspirantoj ne povas fariĝi studentoj. Oni ne pensu, ke nur la nelatvoj ne povas sukcesi en la student-ekzamenoj pro la latva lingvo. Ne, ankaŭ la latvaj lernantoj, kiuj ĉiam parolis latve, kiuj havas latvajn gepatrojn, kiuj ĉiam vizitis latvan lernejon k kiuj, estas eble, eĉ ne parolas aliajn lingvojn, k kiuj ne volas studi filologion, sed medicinon, ĥemion, agronomion ktp., ili ne povas fariĝi studentoj pro la „nekomprenо" de la latva lingvo. Tial mi pensas, ke oni rajtas diri, ke en Latvio oni anstataŭigis la preĝadon per la latva lingvo.

Malmulto ankoraŭ estu dirata pri la situacio de la loka intelektularo. Ĝi estas tre malfacila. Laboron oni povas ricevi nur per „geonkloj" (protektantoj). Pli progresemaj libroj estas malpermesataj. La latviano ne rajtas scii „tro" multe pri sociaj, politikaj, ekonomiaj k seksaj demandoj. Pro tio ni nuntempe ankoraŭ havas tre malmulte da socialistoj inter la intelektularo.

A. Kurmis, Riga.

Klaskonscia SAT-ano ne portas nacian aŭ neŭtralan esperanto-insignon, sed

NUR LA SAT-INSIGNON!

Per tio, li ne nur propagandas por

ESPERANTO

sed ankaŭ por sia tutmonda organizo. Pingloj, butonoj, broĉoj — Diametro 16 mm. Prezo: **0,80 mk. germ.**

Administracio de SAT, Leipzig O. 27 Kolmstrasse 1

Letero el Usono al „S-ulo" k la SAT-anaro.

Karaj Gek-doj! Estas neeviteble, ke mi skribu al vi pri la samaj „jam delonge konataj aferoj, kiujn ĉiu gazeto laborista remaĉas sen nia SAT-Esperanto-Servo". Sed ŝajnas al mi, ke almenaŭ en ĉi-kazo, oni ne povas sufiĉe ofte ripetadi, ke

Toĉjo Muni (Mooney) k Bilings (Billings) ankoraŭ troviĝas en malliberejo! Malantaŭ la fortikaj muroj de l'malliberejo Sen Kventin (San Quentin) en Kalifornio sidas depost 15 jaroj homoj, kies kredo al la solidaro de la laboristaro estas ilia vertebro. Pro tiu kredo Muni ne kadukiĝis, kvankam la malliberejo fosis sulkojn sur lia vizaĝo k paligis lian hararon. Li ankoraŭ staras kiel rekta homo.

Tion montras nova pledo de T. Muni konstrui *vere* unuecan fronton de ĉiuj lab.organizoj ĉirkaŭ „T. Muni-Bilings Komitatoj", kiuj daŭre zorgadu, ke Kalifornio havu fifamon en tutmondo. Montriĝas en la pledo la blankardo de animo kredema al laborista solidaro, per kiu li esperas veki la koleron de l'giganto-laboristaro.

Ne plu li esperas veki la konsciencon de ŝtatestroj de Kalifornio, kiuj unu post la alia transprenas la plej altan oficon en la ŝtato ne purigante ĝian blazonon. Ja leviĝis legio post legio por postuli la liberigon por Muni k Bilings. Inter la eminentaj troviĝas: la kondamninta juĝisto, ĉiuj vivantaj ĵurintoj, kiuj „tiam" juĝis ilin kulpaj; kapitanoj de la polico k de detektivoj, kiuj „tiam" persekutis, vico da senatanoj el la supera leĝdonejo de Usono k, ne laste, komisiono, kiun aparte nomis prezidanto Ŭilzn (Wilson). Ĉiuj ili hodiaŭ havas la firman konvinkon, ke Muni k Bilings troviĝas en malliberejo senkulpaj. Kaj tamen neniu ŝtatestro Kalifornia, kiu sola, laŭ la komplika tiea leĝaro, povas meti en liberon ambaŭ viktimojn, kuraĝas agi kontraŭ la volo de la „Energia k Fervoja interesoj", se ne ondego de l'publika opinio devigos la plumingon en la manojn al la ŝtatestro de Kalifornio.

Tial diras Toĉjo: „Mi estas pli certe mallibera hodiaŭ ol kiam unue arestita. La diktatoroj de l'kapitalo scias, ke la ekonomiaj kondiĉoj estas tiel malbonaŭguraj, ke nun deklari liberigon signifas kvazaŭ forĵeti ekbruligitan alumeton en pulvujon. Ni devos pruvi, ke ankaŭ mia daŭrigata enkarcerigo ne servos al iliaj celoj. Tiu ĉi alvoko estu la fajrero, kiu ekflamigos senkomparan brulegon, — agitadon, kiu vekos la amasojn por postuli mian senkondiĉan liberigon, kiel tiun al ĉiuj malliberuloj pro klasbatalo"!

Jen, karaj Gek-doj, „pramalnova" rakonto. Ĝi ne plu havas la allogpovon de sensacio. Ĉe tiuj, al kiuj tragedio el la klasbatalo estas nur distra legaĵo, mia letero nur kaŭzos ekĝemon k poste reforgeson. La aliajn la voko de T. Muni ekstarigos en unuecan fronton, malgraŭ ĉiuj aliaj disputoj k diferencoj. Muni mem scias, ke ne estas facile al kelkiuj kunlabori unu kun la alia. Sed fine nur afero de malliberaj klasbatalantoj estas tereno, sur kiu la klasbatalaj armeeroj povos kune marŝi por cedigi la regantojn.

La SAT-anoj estu la unuaj en la fronto. Ili konigu ĉi tiun leteron. Ili instigu siajn organizojn al solidara ekago en la tuta mondo. Solidaro ja ne mortas, ĉar la fama kazo „malnoviĝis", aŭ ĉu vere? Ne, milfoje ne! Ĝuste tial bruladu la vundo. Restu nia devizo: Maljusto kontraŭ unu, estas maljusto kontraŭ ĉiuj"!

Kun solidaraj sentoj por Toĉjo Muni k Bilings

via SAT-ano 1307.

La manifesto de la britaj maristoj.

„Ni, la lojalaj regatoj de Via Reĝa Moŝto, per ĉi tio prezentas al Niaj Lordoj Komisaroj ĉe la Admiralitato nian reprezentanton, por ilin petegi pri reekzameno al la drastaj malaltigoj de la salajroj, kiuj estis trudataj al la plej malalte pagataj ŝipanoj.

Evidentas, al ĉiuj koncernatoj, ke ĉi tiu malaltigo signifas tragedion, mizeron k senmoralecon en la familioj de la malalte pagataj ŝipanoj, k, escepte se garantiita, skribita interkonsento estas ricevita el la Admiralitato k konfirmita de la Parlamento, konstatanta, ke okazos reekzameno pri niaj salajroj, ni estas decidintaj tutunuece rifuzi veturi je la nova pag-normo.

La ŝipanoj estas tute pretaj akcepti malaltigon, kiun ili opinius pravigita."

El la Ĉiutaga Laboristo (Daily Worker), n-o 531.

Publikigante la ĉi-supran dokumenton, kiu havas historian gravon, ni aldonu mallongan komenton. La respektema, servema tono, laŭ kiu sin esprimas la britiaj maristoj, ne povas tamen kaŝi la fakton, ke ili **malobeis.** *La malobeo estas la unua paŝo sur la vojo al ribelo. Kaj ne povas esti dubo, ke la ribelemaj maristoj imitos siajn kolegojn el Kronŝtat k el Kiel, se ili ne ricevos kontentigon. Kaj eĉ en tiu okazo ili certe ne forgesos, ke nur pro sia malobeo la estroj estis devigataj kapitulace revenigi la ŝipojn en la havenojn.*

Kaj la tutmonda proletaro ricevas per tio plian instruon pri la granda potenco, kiun ĝi disponas: sufiĉas ja, ke la laboristoj krucigu la brakojn, por ke ekŝanceliĝu la tuta kapitalista sistemo.

POR NIA INSTRUIĜO.

La radiado de l'Suno ne povas esti eterna. Kiel la aliaj steloj, ĝi devos morti, tio estas fariĝi estingiĝinta k nigra maso vagadanta en la spaco. La Suno similos forte al la Tero — Tero grandega k senluma, sur kiun sole la steloj brilos. La kuntiriĝo progresanta de la surfaco, kaŭzata per la perdo de l'varmo, transformos la astron en specon de sulkoplena mumio.

*

La bestaro de iu regiono adaptiĝas al la ekzistanta vegetaĵaro. Kvankam la bestaro plej ofte ne multe elstaras en bildo de pejzaĝo pro sia malgrando k ofta malmultnombro, iuj specoj el la bestaro povas akiri grandegan influon sur regionon. Tion montras la beribera muŝo, kiu formortigis en kelkaj teritorioj de Centra Afriko la tutan vivaĵaron.

Pri la kvinjara plano

AL LA SOCIALISMO AŬ AL LA FARAONISMO?

(2. daŭrigo. Vd. la n-ojn 364, 365.)

Mi ne volus trouzi citojn. Tamen, kvankam tio estas klarigita en la „CIVILA MILITO EN FRANCIO", skribita de Marks tuj post la Komuno k en „ŜTATO K REVOLUCIO", skribita de Lenin ĵus antaŭ Oktobro, la laŭdiraj marksistoj, la „maldekstraj" k la dekstraj, tiel tute inverse klarigis al si la ideojn de Marks k Lenin pri tiu·punkto, ke mi opinias necesa reprodukti kelkajn tekstojn el la unu k el la alia.

Deklarinte, ke la laborista klaso ne povus „sin limigi kapti la ŝtatan meĥanismon k uzi je sia profito", poste Marks tiel klarigis, el kio konsistis la ŝtat-transformado, farita de la Pariza Komuno, transformado, kiu, laŭ Engels, estas la unua ekzemplo de proletara diktaturo.

„.. Parizo sin liberigis de l'armeo k anstataŭigis ĝin per la nacia milico, grandparte formita el laboristoj. Necesis aliigi tiun ĉi fakton en institucion. La unua dekreto de la Komuno forigis, do, la konstantan militistaron k anstataŭigis ĝin per la armita popolo.

„La Komuno formiĝis el la urbaj deputitoj, kiuj estis elektitaj per la ĝenerala elektorajto en ĉiuj distriktoj de la urbo, respondecaj k ajnatempe ŝanĝeblaj. La plejparto el ĝiaj membroj estis, memkompreneble, laboristoj, aŭ rekonitaj reprezentantoj de la laborista klaso. La Komuno devis esti ne parolanta, sed aganta kunsidantaro; ĝi posedis, samtempe, la regan potencon k la leĝdonan potencon. La polico, ĝis nun estinta ilo de la ŝtata registaro, estis tuj senigita je siaj politikaj funkcioj k transformita en respondecan organon de l'Komuno, ŝanĝeblan ajnatempe. La sama principo estis aplikata al ĉiuj oficistoj de la administracio. Komencante de la membroj de l'Komuno, de supre ĝis malsupre la socia servo devis esti plenumata por *la salajro de laboristo...*

„Post la forigo de l'konstanta militistaro k de l'polico, de tiuj iloj por la materiala regpotenco de l'malnova registaro, la Komuno..."

Tiel, forigo de la konstanta militistaro, k ĝia anstataŭigo per armita popolo, forigo de politika polico, forigo de la burokrataro, tiel konsiderata: per la alĝustigo de iliaj oficaj salajroj al la nivelo de laboristaj salajroj, tiaj estas, laŭ Marks, la karakterizaĵoj de la proletara diktaturo.

Ĉe Lenin, estas eble ankoraŭ pli klare. Jen, kion oni legas en „ŜTATO K REVOLUCIO":

„La marksistoj proklamas neceson por la proletaro kapti la politikan povon, tute detrui la malnovan ŝtatmaŝinon, k anstataŭigi ĝin per nova, konsistanta el la organizado de l'armita popolo, laŭ la tipo de la Komuno."

„Se la laboristoj unuigas memvole siajn fortojn, tio estos centralismo, sed ĝi sin bazos sur la „kompleta detruo" de la centraligita ŝtato, de la konstanta militistaro, de l'polico, k de l'burokrataro."

„... ni batalos por la detruo de la tuta malnova ŝtatmaŝino, por ke la armita proletaro fariĝu mem la registaro."

Kaj en aliaj nuntempaj verkoj, siaj LETEROJ EL MALPROKSIMO, en printempo 1917, li skribas en sia letero pri la proletara milico de la 11-a de marto 1917 (Internacia Korespondaĵaro, n-o 46, paĝo 368):

„Ni bezonas ŝtaton, sed ne saman kiel bezonas la burĝaro, kun plenumorganoj distingaj de la popolo, k kontraŭaj al la popolo, en la formoj de la polico, de l'armeo k burokrataro. Ĉiuj burĝaj revolucioj nur plibonigis tiun registaran maŝinon k transdonis ĝin de unu partio al la alia... La proletaro devas ‚rompi' ĝin laŭ la vorto de Marks k anstataŭigi per alia, kunfandante la policon, la armeon k la burokrataron kun la tuta armita popolo."

Kaj ankoraŭ, en sia malfermita letero al la delegitoj de l'kamparana Kongreso en majo 1917 (Internacia Korespondaĵaro n-o 57, paĝo 711):

„Ni volas respublikon, sen polico destinita lukti kontraŭ la popolo, respublikon, en kiu ĉiuj oficistoj, de supre malsupren, estu elektitaj k ŝanĝeblaj ajnatempe laŭ la popola volo. Ilia salajro ne devas superi tiun de sperta laboristo. Ni postulas ankaŭ, ke la

---

Por ŝtopi la breĉon faritan en la buĝeto de SAT per la rabo de CK de SEU.

1. listo.

J. Habert — 10 fr. fr., Marthe Planchon — 10, L. Glodeaŭ — 5, S. Tinnland — 5, Ch. Rouillard — 5, E. Lanti — 15, Avid — 10, P. Goirand — 5, Robert — 5, Merigot — 5, Ida — 5, Hamleto — 2, Albert — 5, Bartelmes — 10, X — 4, SAT 740 — 20, Kaiser 10 741 — 10, Cachon — 10, Limuzin — 15, Polgar V. — 50 (sume: 206 fr. fr.), ĉiuj el Parizo, K-dino 16 524, Istanbul — 10 mk. g., G. Douet, Vincennes — 10 fr. fr., Aarse, Amsterdam — 5.05 mk. g., W. J. Eerdman, Rotterdam — 2.70 mk. g., E. Rosen, Slöinge — 1 kr. sveda.

armeestroj estu elektataj k ke la konstanta militistaro, apartigita de l'popolo, komandata de klaso malamika al la popolo, estu anstataŭata de ĝenerala popolarmado, de popola milico."

Sen proletara diktaturo neniu irado al socialismo.

Ĉu tia estas la Sovetia reĝimo?

Ĉu en Sovetio la konstanta militistaro, la polico, la burokrataro estas „detruitaj"? Ĉu la popolo estas armita? Ĉu la ŝtato ne konsistas kiel la burĝa ŝtato, el *distingaj* organoj?

Konsekvence, ekzistas en Sovetio la malnova ŝtato, la klasika ŝtato, la klasa ŝtato, kun ĉiuj siaj kutimaj organoj por subpremo; ne ekzistas la diktaturo de la proletaro.

La rusa proletaro ekkaptis la ŝtatan maŝinon; sed, male al la instruo de la Pariza Komuno, kolektita de Marks k de Lenin, ĝi ne „rompis" ĝin. Ĝi nur rekovris per nova etiketo ĉiujn malnovajn organojn de la cara ŝtato; ĝi parte ŝanĝis la oficistaron: la cara armeo fariĝis la ruĝa armeo, la Oĥrana nomiĝas nun G.P.U. k la grandega cara burokrataro ŝanĝiĝis en la ne malpli grandegan sovetan burokrataron, sed nenio el ĝi estas rompita. Ĉio estas konservita aŭ restarigita en la freneza espero, ke la proletaro povus „funkciigi ĝin je sia profito". Utopio!

Ĉe foresto de la proletara diktaturo, al kio devas konduki la industriigo de Rusio k la meĥanikigo de ĝia terkulturo? Ĝi povas nur konduki al nova formo de l'ekspluatado al la homo fare de la homo, al novaj manieroj de iuj akiri la plusvaloron produktitan de la aliaj.

Ni ne forgesu, ja, ke la ekspluatado al la homo fare de la homo ne estas la nura propraĵo de la kapitalismo; ĝi naskiĝis longe antaŭ ĉi tiu; ĝi naskiĝis tuj kiam la homo estis posedanta teknikon sufiĉan por produkti plusvaloron. De kiam la individuo kapablis produkti iom pli ol estis al ĝi rigore necese por vivi, kelkiuj alproprigis al si tiun ĉi ioman plion: la disdividiĝo en klasojn aperis.

La maniero, laŭ kiu tiu alproprigo okazis, variis laŭ la epokoj. La maniero, kiun praktikas la kapitalistoj, estas la lasta laŭdate. La kapitalismo povas esti detruata, k tamen, sur ĝiaj ruinoj povos stariĝi novaj manieroj de ekspluatado, de alproprigo de la plusvaloro, kiuj ne plu estos la kapitalistaj alproprigaj manieroj, sed kiuj ne malpli estos manieroj de ekspluatado. (Finota.) *R. Luzon.*

Tradukis la Alĝera Esperantista Grupo el la franca revuo „La Révolution Prolétarienne" (La Proleta Revolucio).

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en „S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

La klasbatalo tra la mondo

Pilsudski deziras regi sen opozicio.

La prokuroro de l'respubliko transdonis al la Varsovia tribunalo akuzakton kontraŭ la 11 deputitoj de l' socialista partio k de l'popol-partio, kiuj estis arestitaj en septembro 1930 k enfermitaj en la citadelo de Brzesc, poste liberigitaj kontraŭ kaŭcio. Laŭ ĉi tiu akto la deputitoj estas akuzataj pro *krima aktiveco kontraŭ la ŝtato* (paragrafo 100 de l'punkodo: laŭ ĝi la puno estas dumviva malliberigo) aŭ preparado de tiaj krimoj kontraŭ la ŝtato (paragr. 101, laŭ kiu estas difinita puno de 10 ĝis 15 jaroj da malliberigo). La proceso okazos la 26-an de oktobro. Oni devas konfesi, ke Pilsudski estas majstra lernanto de Musolini!

La sociaj konfliktoj en Hispanio.

En la tuta regiono de Kordobo la terkulturistoj troviĝas en stato de ribelemo. En la proksimo de tiu urbo la terkulturistoj deklaris, ke ili volas labori nur ok horojn estonte, k ke ili ekstrikus, se oni ne konsentus al ilia postulo. — En Katalunio la konflikto inter bienposedantoj k farmuloj serioze pligraviĝis. La farmuloj postulis laŭ la registaraj dekretoj de l'11. julio k 6. aŭgusto la revizon de l'kontraktoj, kiuj ligas ilin al la posedantoj. La farmuloj ne plu transdonis al la posedantoj la interkonsentitan produkto-parton, sed pagis nur 5 % de ĝia valoro. Fine, post longaj diskutoj, estis konsentite al la farmuloj postuli la revizon de l' kontraktoj; dume ili rajtos transdoni reduktitan elcenton el la produktokvanto al la posedantoj. La nombro da farmuloj en tiu konflikto partoprenantaj estas 32 000.

Amasaj arestoj en Usono.

La Nov-Jorka policistaro atakis 5000 laboristojn, kiuj volis malhelpi la elloĝigon de la familio de negra laboristo. 21 personoj estis arestitaj. En San Francisko la senlaboruloj organizis manifestacion antaŭ la urbdomo. La policanoj atakis la amason k arestis 24 laboristojn.

Kion la entreprenistoj forsilentas.

En sia rekomendado de ekstrema ŝparemo al la laborulaj amasoj, kiun tre intense prizorgas lastatempe en Germanio la industriistoj k aliaj ekonomiaj ĉefoj k politikaj gvidantoj de l'partioj, kiuj defendas la interesojn de l'posedantoj, ĉi tiuj sinjoroj forsilentas honteme kelkajn interesajn faktojn: Laŭ konstatoj de Teod. Hebiŝ ekzistas en Germanio 220 nobelaj grandbienuloj, kies posedo ampleksas 2000 hektarojn k pliaj 483, kiuj disponas pri pli ol 1000 hektaroj da kulturata grundo. Do al ĉi tiuj 703 nobelaj bienuloj kune apartenas 1,5 miliono da hektaroj. Laŭ esploro de la revuo „La Ago" (Die Tat) la 110 plej riĉaj homoj (aŭ familioj) en Germanio posedas kune valorojn de 3,4 miliardoj da germ.mk., ĉiuj aliaj (proks. 2000) milionuloj kune posedas 2,2 miliardojn. El la 110 estas grandbienuloj — 35, industriistoj — 42, la aliaj estas komercistoj k bankieroj.

La direktoro de l'Tubara (mastra) sindikato havas jaran salajron de 110 mil gmk. sen la kromenspezoj, la direktoro de l'Ŝtal-unuiĝo 180 mil gmk., de Krup (Krupp) 120 mil gmk.; tiu de l'I.G.-Farbindustrio ricevas 500 mil gmk., ĉefdirektoro Kuno de l'Hamburg-Amerika ŝipkompanio nur 600 mil mk. Ĉi lasta malriĉulo ricevas krome por la farita laboro estri la ministraron la modestan pension de nur 18 285 gmk. La prezidanto de la Ŝtata Banko jare enspezas 340 mil mk., liaj subdirektoroj po 180 mil mk.

Nur, ĉar „ni" estas tiom malriĉaj, ni devas ŝpari. Nur pro tio la meza salajro estas 1800 ĝis 2000 mk. jare. Senlaboruloj ricevas la sumegon de 400 ĝis 1200 mk. (ĝia alto varias laŭ la antaŭa salajro k nombro da familianoj). Pri la maljusto de tiu stato tamen neniam konsentos la mastroj; ekzistas nenia alia rimedo ol batale elakiri la juston k la rajton, prepari la spiriton de la proletoj en la senco de l'klasbatalo. *Laŭ komuniko de 1378.*

La striko de domluantoj en Roterdamo.

Roterdamo kiel unu el la plej gravaj havenurboj de la kontinento eŭropa same kiel la aliaj suferas pro la mondkrizo k jam dum jaroj la haven-laboristoj estas grandnombre senlaboraj, kompreneble ankaŭ tiuj el la dependaj entreprenoj (sipkonstruejoj, transport-entreprenoj ktp.)

„. . . Oni nepre estas logata per la forto k la subtilo de la intelekto de E. Lanti, kiu esploras la demandojn el ĉiuj flankoj k profunde enpenetras ilin. Per lerta apliko de la paradokso, li igas tute aparte altiraj ĉi tiujn riĉhavajn paĝojn. Je la lingva vidpunkto la verko estas perfekta. . . ."
G. A.

Tia estas unu inter multaj aliaj simile favoraj opinioj esprimitaj de la recenzistoj pri

Vortoj de K-do E. Lanti

Kun antaŭparolo de **L. Banmer.**

Plie ĉiu notu bone en la memoron, ke en ĉi tiu libro estas troveblaj respondoj al multaj demandoj, kiuj senĉese restariĝas — ĉu pro forgeso ĉe malnovaj SAT-anoj, aŭ pro nescio ĉe novaj.

Formato: 12×19 cm. 192 paĝoj.
Prezo: 12 fr. fr. aŭ 2 mk. g., 2 ŝil., 0,50 dol., 2.50 svis. fk., 1,25 guld.
Rabato je 20% al aktiv. SAT-anoj.

Ne prokastu havigi al vi la volumon.

Sidejo de SAT: 23, rue Boyer, Paris XX.
Administrejo: Kolmstr. 1, Leipzig O 27.

Priskribo de la krizo jam ofte estas verkita en „S-ulo“, sed mi volonte scius, ĉu la efikoj montriĝas ankaŭ en aliaj urboj same kiel en Amsterdamo k Roterdamo, nome per amasa rifuzo pagi la plialtigitan aŭ plialtigotan domlumonon.

La domposedantoj (tie ĉi nomitaj dom-melkantoj) utiligis la malabundon je domoj por plialtigi la domluprezojn; dum k kelkajn jarojn post la milito ili estis malhelpataj per leĝo; ili komencis fervore „melki“ la domluantojn, kiam likvidiĝis tiu leĝo.

Aperis protestoj en la gazetoj laboristaj, kontraŭdiraĵoj en la burĝaj, k la posedantoj daŭrigis melki, melkadi, melkegadi...

Subite preskaŭ samtempe en Amsterdamo k Roterdamo la luantoj organizite rifuzis pluan pagadon. En Amsterdamo la strikantoj triumfis sen interpuŝiĝoj kun la policanoj, sed en Roterdamo la venko nur venis post pluraj interbataloj. Trideko da luantoj strikis k la gvidanton oni eldomigis leĝe, sed multaj homoj plenigis la ŝtuparon k ĉambron k nur post ega rezistado la meblaro estis portita sur la straton. Tio estis la komenco de la interpuŝiĝoj. La simpatiantoj venis amase ĉiun vesperon. Armeoj da stratbuboj (13—18 jaraj) komencis provoki la policistojn k tiuj ĉi, ne edukitaj homoj, perdis siajn cerbojn k disbatis la amason.

La policanoj ne ĝuas la simpation de la laboristoj, kvankam fakte ili estis laboristoj; ilia devo estas prizorgi la publikan ordon, sed pli k pli fariĝas helpantoj k defendantoj de la kapitalismo. La urbestraro jam delonge komprenas tion k pagas pli altan salajron al ili. Tamen ni pripensu, ke ankaŭ la panakir-problemo devigis ilin fariĝi policanoj. Ĉu ili restos fidelaj al la sistemo kapitalisma, kiam venos la momento de la finbatalo? Mi dubas pri tio.

Post unu el tiuj ĉi interbataloj, laŭdire kelkaj knaboj ĵetis el malluma strato ŝtonojn al policistoj k tiuj komencis pafi kun la rezulto, ke parolanta viro estis mortigita. Senkulpa viktimo de la necerbhava policanaro, kiu fakte defendis la domposedantojn aŭ almenaŭ sentakte agis kontraŭ la laboristoj.

Ankaŭ en aliaj urbkvartaloj komenciĝis pagstrikoj kun diversaj rezultoj k denove kun interpuŝiĝoj inter polico k popolo.

Tiel montriĝas la sinteno de l'domposedantoj; kvankam la burĝaj gazetoj neadas, ke oni elsuĉas la domluantojn, la urbestraro komisiis komisionon esplori la luprezojn.

Domaĉoj estas plialtigitaj de 3 guldenoj (ĉ. 1.20 dol.) ĝis 5—6 guldenoj semajne, en la daŭro de kelkaj jaroj. La hominda sinteno de tiaj domposedantoj montriĝas klare per jena fakto: SAT-menbro konstruis lumbildkeston por meti malantaŭ la fenestro, kun sekvantaj sendanĝeraj vortoj: „Arbeiders leert Esperanto“ (Laboristoj lernu esperanton!). Rezulte, post interparoladoj, li estis devigata forlasi la domon, ĉar la domposedanto ne aprobis la rekomendon al esperanto.

La esprimoj „malsprituloj, elsuĉuloj, parazitoj“ ne tiel bone karakterizas la domposedantojn ol la nederlanda esprimo: „Domet-melkantoj“. *E. 17011.*

Forigu la burĝajn sensencaĵojn!

„Kontento alportas feliĉon“. Leginte ĉi tiun proverbon en laborista loĝejo, mi demandis min: Ĉu tiu ĉi K-do k lia edzino scias, kion signifas esti socialisto? Preskaŭ oni devas dubi pri tio. Socialisto estas batalanto kontraŭ la kapitalismo k do, batalanto kontraŭ privata posedo. Kontenta laboristo ne postulas pli altan salajron, pli belan loĝejon k pli multe da libera tempo. Certege, la kapitalistoj preferas tiajn laboristojn. Sed, ju pli kontentaj estas la laboristoj, des pli granda estas la profito de l'kapitalisto. Kontenta laboristo subtenas la kapitalismon, sed ne kontraŭbatalas ĝin. Kaj tial:

Tiaj proverboj estas fiburĝaj! Malaperigu ilin el laboristaj loĝejoj! Forigu la burĝajn sensencaĵojn! Tiaj proverboj estas opio por la proletaro. Per tiaj proverboj oni provas kovri per nokta vualo la cerbojn de laboristoj.

Kial do tiu K-do ne forigas tiun proverbon el sia loĝejo? Ĉu pro nekompreno aŭ ĉu pro hezitemo? Sed, por ornami laboristan loĝejon, oni trovus certe pli belajn sentencojn! Ekzemple:

„Ĉio por aliuj, nenio por si mem.“

„Vivu, kiu laboras.“

„Amantoj estu batalantoj duope“, k.a. *K. Gelmayer (17117).*

DISKUTEJO:

Ĉu ne ankaŭ dogmo?

Kara K-do F. S.! Vi publikigis artikolon „Pastroj imitas Sovetion“ (en n-o 361, sub la rubriko „Kontraŭ la dogmojn“). Komence de tiu artikolo vi asertas, ke la pastraro agitaĉas kontraŭ Sovetio pro nuraj ekonomiaj kaŭzoj. Ĉar, tiel vi konkludas, la soveta kolektivismo minacas la kapitalismon. Laŭ vi, ĉia religieco baziĝas nur sur privatmastruma pensmaniero.

Tiam vi tre mirigite konstatas, ke monaĥoj uzas traktoron (en Aŭstrio, kies terkulturo estas tre neprogesema!), do, la plej modernan maŝinon terkulturan. Nu, tion oni ja ne povas nomi imitado al Sovetio. Ĉar en kapitalistaj landoj oni ja uzas traktorójn en la terkulturado jam pli longe ol en Sovetio! Ke la katolika eklezio uzas la plej modernajn teknikajn ilojn por akceli siajn celojn, por tio mi povas citi pliajn ekzemplojn:

La katolika gazeto „La Nova Regno“ (Das Neue Reich) raportas meze de 1929: „La MIVA (Missions-Verkehrs-Arbeitsgemeinschaft = kooperativo por komunikado de misioj) enkondukos, komence de l'sekvonta jaro, kombinitan misian komunikadon per aŭtomobiloj, motorŝipoj, aeroplanoj k senfadena telegrafio, en la treege malfacile traireblaj partoj de l'norda teritorio de sud-okcidenta Afriko. ...“

„La akcidento, per kiu la 12-an de oktobro 1930 estis detruita la aeroplano „P. Market“ de l'jezuitaj misioj en Alasko, ne malfortigis la kuraĝan iniciativon de tiuj malproksimaj misiistoj. Jam anstataŭis nova aeroplano „Belanca“, moderna aeroplano kun ses sidlokoj, la detruitan k faris jam siajn unuajn flugojn. (Sekvas kalkulo pri la pli favora k pli malmultekosta interrilato per la aeroplano.)“ („Munĥena dimanĉa gazeto katolika“ numero 35, 30. 8. 1931.)

Sed tiuj ekzemploj ja nur montras, ke la eklezio ne rifuzas uzi la plej modernajn teknikajn maŝinojn k labormetodojn.

Pli grava estas la demando, ĉu la religieco baziĝas nur sur privatmastruma pensado. Tiun opinion vi bazas sur la vulgara marksista teorio, ke la formo de l'ekonomio difinas la pensmanieron de l'homoj. Nu, mi ĉi tie ne volas pritrakti la psikologian fakton, ke ĉiu homo havas senton por justo k maljusto. Ĉi tie interesas nin la demando, ĉu la eklezioj, precipe la katolika eklezio, dependas de la stato de ekonomio, ĉu ili dependas de tio, ke regas privata mastrumado. Ekzistas du gravaj kontraŭ-argumentoj.

La unua estas la ekzistado de l'katolika eklezio jam de 1500 jaroj. Dum tiuj 1500 jaroj la ekonomio ŝanĝis kelkfoje sian esencon, sed la katolika eklezio estas ankoraŭ nun la sama, ĝi ne nuligis iun el siaj principoj. La progresinta ekonomio de l'roma imperio ĉesis; ĝin anstataŭis la primitiva ekonomio de l'germanaj konkerantoj. Sed, influite de la konkeritoj tiu ekonomio progresis ĝis prospero de mezepoka ekonomio, ekonomia stato, en kiu dum proks. du jarcentoj fakte ne ekzistis ekonomia subpremado; tiam aperis feŭdismo; el ĝi estiĝis la nuna industria kapitalismo. La katolika eklezio ŝanĝis eksterajn formojn, sed ne siajn prin-

---

Kio la komunismon distingas, tio estas ne la forigo de l'propraĵo entute, sed la forigo de l'burĝa propraĵo...

La propraĵo en sia hodiaŭa formo moviĝas en la antagonismo de kapitalo k dunglaboro...

La komunismo prenas al neniu la povon alproprigi al si sociajn produktojn, ĝi prenas nur la povon per tiu ĉi alproprigo subjugigi fremdan laboron.

El „La Komunista Manifesto“ (Marks-Engels).

cipojn. Nun ĝi jam preparas pozicion, kiu ebligas al ĝi ekzistadon sub kolektiva ekonomio. Jen:

En Meksikio, la ĉefepiskopo *Ruis i Flores* faris radio-paroladon. „La delegito parolis pri la nuna ekonomia krizo. Pri tiu li nomis respondecaj tiajn ekonomiistojn, kiuj favoras la senskrupulan eluzadon de l'laboristoj fare de la entreprenistoj. La ekvilibro en la homa socio estas malhelpata, se unu klaso estas *maljuste preferata* je kostoj de alia. ...“ („Munĥena dimanĉa gazeto katolika“ n-o 28, 11. 7. 1931.) Kaj ne longe post tiu radio-parolado en Meksikio usona episkopo parolis antaŭ la *Kolumbus-Kavaliroj* (katolika asocio usona el riĉaj k influhavaj homoj) pri la neceso, atenti pli multe la dividanton ol la dividendojn. Ankaŭ kardinalo *Faŭlhaber* (Munĥeno) jam diris similajn vortojn.

Alia pruvo: *Paragvajo* estis dum du jarcentoj komunista ŝtato sub gvido de — jezuitoj!

Tiuj faktoj do pruvas, ke por la eklezio la stato de l'ekonomio ne estas decida. Por la eklezio estas decida nur la eblo praktiki sian spiritan superregadon. Kiu endanĝerigas tiun eblon, tiu estas malamiko k tiun la eklezio atakas k ekstermas per ĉiaj rimedoj.

Tiel ankaŭ Sovetion. La soveta registaro forigis la ŝtatan subtenon al la eklezio, ja subtenas la kontraŭulojn de l'eklezio. Ĝi ankaŭ malebligis al la eklezio akiri propraĵon, do, krei financan bazon por sia laboro. Do, en Sovetio la eklezio devas fidi nur al sia spirita potenco (kiu certe ne estas malgranda). Krome, la eklezia laboro estas nun ege malfaciligita per la kvintaga semajno. Tio tute sufiĉas, por ke la papo agitaĉu kontraŭ Sovetion, tiom pli ĉar li povas esperi akiri novan grandan ŝafaron, se li sukcesos. Li jam sukcesis, ke diversaj partioj agitaĉas kontraŭ Sovetio. Li jam sukcesis, ke kelkaj parlamentoj ĝoje ekprenis tiun instigon por same agitaĉi kontraŭ Sovetio. En Germanio ni jam havas specialan leĝon kontraŭ liberpensuloj (parenteze: proponita de *Severing*, socialdemokrata ministro). Certe, la papo sin ligas kun kapitalistoj por kontraŭbatali Sovetion, sed tion li ne faras pro ekonomiaj kaŭzoj, sed nur por certigi sian spiritan superregadon.

Oni devas koni la fundamentan eklezian principon por fari ĝustajn konkludojn. Aliel oni supozas, ke la pastraro celas nur ekonomiajn avantaĝojn per sia spirita superregado. Sed tiu supozo estas malĝusta. La plej belan priskribon el tiu eklezia fundamenta principo donis *Dostojevski* en sia rakonteto „La ĉefinkvizitoro“: La homoj estas bestaro, kiu nur interbatalas, kiu ne kapablas decidi racie k dece pri sia vivo; ĝi bezonas gvidon, kiun nur la eklezio povas doni al ĝi. Pro tio la eklezio postulas la spiritan regadon super la tuta mondo! Pro tio ĝi estas ankaŭ la plej forta kontraŭulo de l'socialismo. Ĉar ni ja interkonsentos: socialismo signifas ne nur ekstermon de l'ekonomia, sed ankaŭ de l'spirita ekspluatado.

Sed por sukcesi, ni mem ne devas esti dogmemaj. Ni ne faru teorion k serĉu tiam faktojn, kiuj eble konfirmas tiun. Ni ekzamenu la faktojn por konklude el ili starigi firman teorion.

16900.

Forigo de grandbienoj ne estas socialisma ago.

En „S-ulo“ n-oj 361 k 362 skribas K-do V. (16900) en sia artikolserio „La fonto de senlaboreco“ jenon:

„Kiel ni forigu la senlaborecon? La mallonga respondo estas: Forigo de l' termonopolo! Dispartigo de l'granda terpropraĵo“.

Kvankam la K-do bazas sian artikolon sur la skribaĵoj de aŭtoritataj personoj, mi tamen ne povas konsenti kun la supre menciitaj „principoj“. Kiel ekzemplojn donas la aŭtoro interalie ankaŭ Sovetion, kie la unua k plej grava ago de Lenin estis — elproprigo de grandbienuloj. Sed — ĉu do en Sovetio tamen la grandbienoj estis dispecigitaj? Eble en la komenco parte, sed — poste estis instalita kolektiva, „kolĥoza“ grandbien-kulturado! K-do V. eĉ skribas: „... dispartigo de grandaj bienoj k enlanda koloniigado estus dankinda tasko de l'sindikatoj.“!

En la sama n-o (362) de „S-ulo“ K-do Maran en sia artikolo: „A. Filip pri la moderna Hindio“ kritikas la Gandhi-an movadon k trovas, ke ĝia plej granda manko estas la celado — restarigi vilaĝan industrion k kontraŭbatali la naskiĝantan grandindustrion. Ankaŭ la celadoj en terkulturdo anstataŭigi terkulturadon en grandaj bienoj per terkulturado en multaj etbienoj estus samaj erarpaŝoj kiel tiuj de Gandhi.

En etbienoj la kamparanoj neniam sukcesas ricevi tiel grandajn rezultojn kiel en grandbienoj. Terkultur-maŝinojn ja ne kapablas aĉeti la etbienuloj pro la altaj prezoj de l'maŝinoj. Ankaŭ en etbienoj oni ne povas eluzi la maŝinojn plene, ili devas esti nelaborantaj dum tre longa tempo. Por malgranda kvanto el la rikolto uzi la maŝinojn estas neekonomie. Tamen estas ja fakto, ke per maŝinoj ankaŭ en agrikulturo oni povas akiri multe pli bonajn rezultojn ol prilaborante ĉion per homa forto. Etbienuloj ja ankaŭ havus eblon uzi maŝinojn, se ili fondus kooperativajn societojn por maŝinuzado. Sed — plej malfacile organizeblaj estas la kamparanoj, kiuj preferas kulturi la teron per sia propra homforto ol unuiĝi k kooperative uzi la maŝinojn.

En etbienoj ankaŭ pleje ekspluatataj estas de siaj propraj gepatroj la infanoj. Ili devas paŝti la brutaron, poste servi kiel geservistoj en la etbieno k kompreneble ricevas nek suficajn klerigon nek salajron.

Dispecigante grandbienojn ni ricevas grandan kvanton da novaj ter*posedantoj*, kvankam etposedantojn. La praktiko de grandbien-dispecigo en baltaj ŝtatoj (Estonio k Latvio) montris, ke la novaj etbienuloj, kiuj post la revolucio 1917 ricevis etan terpropraĵon, tute ne restis radikaluloj, sed ili baldaŭ fariĝis same konservativaj kiel iliaj pli malnovaj kolegoj-ter*posedantoj*, kamparanoj. Diferenco estas nur, ke la malnovaj terposedantoj eble havas pli ol 30 hektarojn da tero, sed la novaj nur ĝis 30 hektaroj.

En la efektivigo de socialismo estas multe pli facile ŝtatigi, komunumigi la grandbienojn, ol komenci la batalon kontraŭ mez- k etbienuloj pri kolektivigo de terposedaĵo. Ankaŭ estas multe pli facile organizi la terlaboristojn en grandbienoj k klarigi al ili la signifon de socialismo, ol en mez- k etbienoj. La socialistoj en la landoj, kie oni post la revolucio anstataŭ la ŝtatigo de grandbienoj dispecigis ilin k donis por kulturi al etbienuloj (en Estonio), nun bedaŭras, ke ili ankaŭ kunhelpis al tia dispecigo. La celo de marksanoj estu — kolektiva terkulturo (en Sovetio). En kapitalistaj landoj ni celu: la teron posedu nur la ŝtato, de grandbienposedantoj oni forprenu la teron k ĝin posedu la ŝtato aŭ la kamparana kolektivo, por ke oni povu per modernaj terkultur-maŝinoj akiri el la tero plej altan kvanton da rikolto.

Nun, en kapitalismaj landoj ni ofte devas konsideri, ke en la grandbienoj oni ne sufiĉe bone kulturas la teron

POR la aŭtunaj kurskomencoj, elementaj k progresigaj kursoj, mendu viajn librojn nur ĉe la ADMINISTREJO DE SAT, Kolmstrato 1, Leipzig O 27.

POR NIA MEDITO.

Mi jam diris, ke oni povas fariĝi demagogo nur pro politika naivo... Kaj mi ne laciĝos ripetadi, ke la demagogoj estas la plej malbonaj malamikoj de la laborista klaso. Efektive, ili vekas la malbonajn instinktojn de la amasoj k estas neeble al la neprogresintaj laboristoj ekkompreni tion, ĉefe se ili estas sinceraj. La demagogoj estas la plej malbonaj malamikoj de la laboristaro tial ke, en ĉi tiu epoko de opiniŝanĝiĝoj k de provadoj, en kiu nia movado serĉas sian vojon, nenio estas pli facila ol demagogie delogi la amason, kies okuloj povos esti malfermataj nur de plej amaraj spertoj.

Lenin.

k ne instalas la uzon de modernaj terkulturmaŝinoj, ĉar la grandbien-posedantoj jam sufiĉe multe por si mem ricevas da rikolto aŭ ili ne povas la rikolton por al ili sufiĉa prezo vendi (konataj estas la faktoj, ke en Sud-Amerikaj landoj oni hejtas per tritiko la fornojn, dum en la aliaj partoj de la mondo la laboristaro malsatas). Sed — tio estas sekvo de l'kapitalisma sistemo!

Dum kapitalisma tempo ni tamen ne povas elproprigi la grandbienulojn k dispecigi ilian terpropraĵon al senlaboruloj. Estas multe pli bone por ĉiuj laboristaj partioj daŭrigi sian konscian programon k postuli la kolektivigon de la tero, ne la dispecigon. Nur en la socialisma sociordo la tero povas utili al ĉiuj homoj.

Kaj fine — „la maŝino estas liberiga potenco“ ... ankaŭ en la agrikulturo — „ĝi naskas en la homo novajn bezonojn k dezirojn ... ĝi permesas al li multobligi mireginde la nombron da produktoj *ĉiuspecaj*“. — Tiu frazo validas ankaŭ por la agrikulturo.

Gravas do kontraŭbatali ne grandbien-kulturon, sed la kapitalismon k por tio organizi la laboristojn, ankaŭ kamparajn. *N. Ruus (15 428) Estonio.*

Respondo al Latviano en n-o 363.

Pardonu, K-do, ke mi malkonsentas kun vi rilate al via amdifino. Mia-opinie, Amo ne havas difinon. Tiu, kiu volas rigardi la amon sub formo de Vero, sen senti ĝin ensorbita en la sango de l'animo, ne povas difini al si, kio estas Amo. La amo, ĉar ne estas scienco, transpasas la matematikajn limkalkulojn, k ne lokhavas en la mallarĝaj cirkloj de la Vero, ĉar la amo naskiĝas eterne de si mem k neniam estas sama en du momentoj de l'vivo.

Sekve, mi ne povas samopinii kun vi, ke virino ĉiam preferas riĉulonburĝon. Feliĉe, mi kredas, ke ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj, malŝatante ĉiajn riĉojn k komfortojn, kontentiĝas milfoje k dankeme per sia amato — por mi plej valora trezoro de l' mondo; — kvankam en mia kazo, domaĝe, ne okazis tiel...

Mi dankas, kara K-do, vian solvon k difinon, sed kredu, ke malgraŭ mia granda amo al mia amatino, se mi scipovus, ke ŝi amrespondus min nur tiam se mi iĝus egalriĉa k klera en sama kulturo, mi preferus resti sola kun mia malriĉo k mia kulturo.

R. Kiles (13661).

SCIENCO K TEKNIKO.

Pri dolĉa k sala akvo.

Oni kutime diras, ke la akvo de l' riveroj estas dolĉa; ĝi estas efektive tia, kompare kun tiu de la maro; sed ĉi tiu dolĉo estas relativa, k ne ekzistas iu akvofluo, kiu ne entenas solveblajn salojn, el kiuj la plej ordinaraj estas la kloratoj k sulfatoj el natrio, potaso k magnezio. Se, hazarde, vi dubus pri tio, prenu ĉe via fontano glason da „pura“ akvo k verŝu en ĝin guton da arĝent-nitrato: tuj vi vidos aperi karakterizan kolorŝanĝon atestantan pri la ĉeesto de kloratoj; la sama ago farata per enkonduko de bari-klorato, montros al vi la ekziston de sulfatoj solviĝantaj, k vi havas ĉiujn rajtojn procedi al kompleta analizo, kvalita aŭ eĉ kvanta. Necesas do rekoni la faktojn; la plej klara akvo enfermas postsignojn pri dissolvitaj saloj; k cetere la origino de tiuj ĉi saloj klariĝas facile: la pluvaj akvoj, kiuj falas sur la montdeklivojn, detavoligas konstante la ŝtonegojn, kiuj ilin formas; ili atakas ilin, dank' precipe al la karbonacido, k dissolvas ĉion, kio estas solvebla; tiel okazas, ke la feldspatoj, kiuj konsistigas la graniton, fine donas argilon. Ĉi tiun argilon la akvofluo forportas ĝis la enmariĝo de l'rivero[1], sed la potasaj k sodaj saloj, kiujn ili (la feldspatoj) entenas, dissolviĝis en la akvo k estas fortrenitaj kun ĝi.

Fine, kiom ajn malforta estu la dozo da saloj entenitaj en la fluantaj akvoj, rezulte por ĉiuj riveroj de l'mondo, tio faras seriozan sumon: ekzemple la Sen (Seine), kiu estas nur rivereto flanke de la Misisipi aŭ de l'Amazon-riverego, ĵetas en la maron, dum ĉiu jaro, kelkajn 40 mil kubmetrojn da salo; la Ron (Rhone) liveras da ĝi sesoble pli k, por ĉiuj surteraj riveroj kune, la irlanda geologo Ĵoli (Jolly) taksas la tergloban liveradon da salo *je ducent milionoj da kubmetroj jare.*

Tiuj ĉi nombroj starigas fakton, pri kiu multaj homoj dubas, ĉar ili ne iomete pripensis tion, k kiu estas tamen nerefutebla: nome, ke *la maro estas salumata de la riveroj.* Efektive, la ekvilibro de l'oceanoj estas ŝuldata al du kontraŭaj efikoj, kiuj egaliĝas k neŭtriĝas: la elvaporiĝo, kiu ilin foruzas, k la alportaĵo de la riveroj, kiu ilin kreskigas. La elvaporiĝo forprenas al ili, oni komprenu, nur la plene dolĉan akvon, dum la rivera alportaĵo reprezentas, ĉiun jaron, 200 milionojn da kubmetroj da saloj, kiuj aldoniĝas al la salmaso jam ekzistanta; tiel, la saleco de l'oceanoj kreskas laŭ ritmo ne per petoj ŝanĝebla, sed sufiĉe malrapida por ke estu neeble konstati ĝin per la plej delikataj ĥemiaj analizoj: post ducent jaroj, ĉi tiu sal-enteno ne povas esti kreskinta je pli ol unu miliono. La fakto ne estas malpli nerefutebla, k ĝi klarigos al ni eble iun tagon fenomenojn, kiujn ni nuntempe nur povas konstati: kiam la salmoj kontraŭflue sekvas la riverojn por tie fraji, eble ili memoras, ke iliaj prauloj vivis en malpli salumitaj akvoj, k tial speco de nostalgio atavisma pelas ilin ĝis la dolĉaj akvoj en la momento mem, kiam ili devas konfidi al la destino sian delikatan idaron.

[1] Ekzemple oni trovas ĝin ĉe la Kamarg (Camargue), — insulo formita el la du ĉefaj brakoj de l'Ron (Rhone) ĉe la enmariĝo de tiu rivero.

Pri elsendoj radiofoniaj.

La transsendo de elektraj signaloj, kiu estis kvazaŭ la unua respondo al la problemo stariĝinta en nia epoko pri rapidaj interligoj, estis la telegrafo k la telefonio (perfadena). Ĝiaj elementoj estis malkovrataj nur post paciencaj esploroj. Tamen, ĝis tiuj lastaj jaroj, la sekretaj komunikoj granddistancaj efektiviĝis sole helpe de kabloj, kies kostoj restis altaj, tiel por ilia starigo kiel por ilia konservado.

Tiam la radiofonio liveris al ni tiun ĉi mirindan rimedon: la interligon longdistancan per la pluplantado de elektromagnetaj ondoj direktataj tra la spaco, sen bezono de interhelpo de cirkvitoj-kondukantoj. El la unua eksperimento praktika bone plenumita naskiĝis la transatlantika telefono London — Nov-Jorko. Oni pensis nur al la apliko de l'grandaj ondoj, kun frekvenco de 50 ĝis 100 kilocikloj, kiuj allasis teknikon jam konatan k relative facile realigeblan. Sed pli profunda studado pri la eblaj perfektigoj pruvis baldaŭ, ke la malgrandaj ondoj, pli ol la grandaj, montrus sin taŭgaj por transsendoj longdistancaj. Dank' al ili povis stariĝi la interligo radioelektra inter Eŭropo k Suda Ameriko.

La grandega avantaĝo, kiun donas al la malgrandaj ondoj ilia nesentemo rilate al la parazitoj, estas tamen egaligata parte per la variado de l'intenso de la ricevataj signaloj laŭ la stato de l'atmosfero, jara sezono, k fine la interdivido de tago k nokto sur ilia vojiro. Tiu ĉi maloportuno, kiu ne povas esti komplete eliminata per aŭtomata aranĝo de variebla plifortigado, necesigas la aplikon de pluraj sagace elektataj frekvencoj. Tiel por la interligo trans la Suda Atlantiko estas uzataj tri ondlongoj: 15 metroj (20 mil kilocikloj), la tagon, 30 metroj (10 mil kiloc.), la nokton, k 20 metroj (15 mil kiloc.), dum krepusko.

La mallongaj ondoj estas facile elsendataj en difinitan direkton de l' spaco. Evitante disĵeton de l'energio, la elsendo efektivigata sur mallongaj ondoj, necesigas nur malfortan potencon k plenumiĝas kun pli bona produktokvanto. La uzado de mallongaj ondoj malfermas nombron da komunik-linioj distingitaj, kiuj multe superas la maksimumon prezentatan per la uzado de l'grandaj ondoj.

TRA ESPERANTIO

Esperanto je la servo de l'Proletaro.

K-do Nathans, Sekretario de Internacia Transportlaborista Federacio, afable metis je nia dispono la tradukon de la parolado, kiun li faris holandlingve ĉe la mikrofono de la Laborista Radio-Asocio la tagon antaŭ la malfermo de l'SAT-Kongreso en Amsterdamo. Publikigante la esencon de tiu parolado, ni opinias, ke tio helpos al niaj propagandistoj. Ili traduku ĝin en sian lingvon k klopodu aperigi en kiom eble plej da gazetoj. La diroj de persono, kiu havas aŭtoritaton en la organizita laborista movado, pripensigos multajn k varbos por nia afero.

Interesiĝemaj aŭskultantoj!

Kamaradoj!

. . . Mi mem apartenis al tiuj, kiuj, kvankam konvinkitaj pri la eksterordinara servo de esperanto kiel skriba kunligilo inter la diversaj landoj, tamen estis skeptikaj pri la praktika uzeblo en buŝa interrilato. Mi opiniis, ke la elparol-diferenco estas tro granda inter ruso, holandano, anglo, hungaro, hispano aŭ ĉino, por krei reciprokan komprenon. Mi pensis pri la multaj okazoj, kiujn mi travivis, kiam ekzemple franca K-do penis esprimi siajn malfacile kolektitajn konojn de la angla lingvo, aŭ kontraŭe iu anglo volis paroli germanlingve. Post nelonga tempo ili rekomencis uzi sian lingvon k prefere akceptis la helpon de tradukisto. Ili sciis sufiĉe, por legi la fremdan lingvon, aŭ eĉ por pli malpli kompreni la parolitajn vortojn, sed la elparolo kaŭzis jam malfacilojn k faris interparolon, kiu konsistus el pli ol kelkaj salutvortoj, neeblaĵo. Same mi aŭdis paroladojn de tre instruitaj homoj, diritajn en lingvo al ili fremda, ne riproĉindajn laŭ enhavo, sen gramatikaj eraroj, sed ĉe kiuj la elparolo estis tia, ke la impreso estis, malgraŭ la kompreno, ridindiga. Se ankaŭ la ridado en tia okazo estas malĝusta k neaprobinda, ĉiurilate ĝi malboninfluas al la intereso k efiko de la parolado. Kaj kiom multaj estas entute, kiuj kapablas paroladi en fremda lingvo, precipe se tio okazu ne preparite, aŭ kiuj povas vere bone esprimi siajn ideojn k pensojn al la eksterlandanoj? Kiel ofte ni ja travivas, ke delegitoj al eksterlandaj kongresoj plendas pri la neeblo sekvi la postulon de sia koro k sen helpo de iu tria, esprimi siajn varmajn sentojn de solidaro k kamaradeco. Sub la impreso de tia momento ili plej ofte decidiĝas lerni la lingvon de tiu lando. Sed plej ofte tio ne efektiviĝas! Kiel ekz. iu franclanda sindikatestro, okupata per ĉiuj zorgoj, kiujn alvenigas lia funkcio k ĝenerale ne plu tre juna, rezervu al si la tempon por lerni lingvon por li tiel malfacilan, kiel ekz. la germanan? Kaj ni foje imagu la tre neverŝajnan kazon, ke li tute ellernis la germanan lingvon: kion li profitas el sia scio, kiam li vizitos anglajn, hispanajn, svedajn K-dojn? Do, li lernu ĉiujn tiujn lingvojn!?

Ĉiu tuj devas konsenti, ke tio estas neeblaĵo!

Havante tiajn praktikajn spertojn, k, kiel jam antaŭe dirite, skeptike pensante pri la praktika uzeblo de esperanto en buŝa interrilato, estis por mi la ĉeesto al Internacia Laborista Esperantista Kongreso, antaŭ kelkaj jaroj en Bruselo, impresa k miriga travivaĵo. Tie ĉeestis laboristoj el plej diversaj landoj k ili kune parolis, kvazaŭ ili estus samlingvanoj! Ne sole pri punktoj de la kongresprogramo, por kiuj ili povis sin prepari, sed ankaŭ tiam, kiam pro diverso de opinioj estiĝis diskutoj k kiam ne estis tempo por trankvilaj preparoj k pripenso. Sendube oni povis iam el la konstruado de la frazoj rimarki, ĉu parolas ekz. anglo aŭ svedo. Sed tio same ne ĝenis la interparolon, kiel ne estas ĝeno pro nekompreno ĉe interparolo de du holandanoj, el kiuj unu devenas el Arnhemo k la alia el Roterdamo.

Pli poste mi povis ankaŭ konstati, kiel dank' al esperanto estas ebla senĝena rilato sur internacia kampo al personoj, kiuj krom sia gepatra lingvo tute ne scipovas alian fremdan lingvon. Mi pensas ekz. pri la sveda parlamentano k kungvidanto ĉe la sveda fervojista sindikato, Eriksson, kiu helpe de la esperantistoj, kiuj nun pli malpli estas ĉie troveblaj, ĉeestas kongresojn en ĉiuj landoj de Eŭropo, eĉ en Bulgario, Polio ktp, kie ja eĉ la kono de diversaj lingvoj ne sufiĉas por bona interkompreniĝo. Aŭ pri la finlandaj fervojistoj k svedaj tramistoj esperantistaj, kiuj dank' al subvencio de la tramkompanio povas fari internaciajn studvojaĝojn pri siaj fakaj aferoj.

Esperanto ŝajnas esti tiel genie konstruita, koncerne frazformon k elparolon, ke la kutimaj malhelpoj ĉe uzado de iu fremda lingvo, por la helplingvo ne ekzistas. La surpriza simplo k facilo de la gramatiko, kiu konsistas el kelkaj reguloj, sen esceptoj, estas laŭ nia opinio konata.

Ĉe la internaciaj kongresoj de Laboristaj esperantistoj oni tial ŝparas *tempon*, — k ne forgesinde, *monon* — por tradukoj, kiuj ĉiam, ankaŭ se oni havas la plej bonajn tradukistojn, ne estas precizaj reproduktoj de la parolitaj vortoj, kiuj ĉiam kaŭzas miskomprenojn k erarojn, kiuj denove sekvigas diskutojn k ĝenojn kun la nova sekvo de senfinaj, tute superfluaj diskutoj, kiuj absolute ne akcelas la reciprokan komprenon. Krome efikas la tradukado ĉiam malbone je la intereso de la kongresantoj, ĉar dum la unuopaj tradukoj estas ĉiam granda parto el la delegitoj senokupa. Kaj multaj aliaj malhelpoj ekzistas, tro multaj por ĉiujn nomi ĉi tie.

Kiel do aspektas en la praktiko la internaciaj kongresoj? Mi memoras pri kongreso de Internacia Ligo de Sindikatoj en Anglio, dum kiu delegito de Nederlanda Ligo de Sindikatoj faris tre bonan paroladon, kiu valoris certe esti aŭskultata de la komenco ĝis la fino de la tuta kongresantaro. Sed la parolanto diris sian opinion en holanda lingvo por tiele povi sin pli bone koncentrigi al la temo. Li parolis proksimume duonan horon. La germana traduko, preciza, kiel la germanoj ja kutime estas, daŭris kvaronhoron, la franca iom pli ol 10 minutojn k la angla tradukisto estis fininta post 5 minutoj. Ĉiu povas mem facile prijuĝi, kio restis el la afera k idea enhavo de tiu parolado. Mi ne plu scias, ĉu oni tiam ankaŭ tradukis en iun el la skandinavaj lingvoj. Se jes, tiam la delegitoj el Svedio, Danio k Norvegio aŭdis nur mallongigitan raporton de la jam tiom mallongigita temo. Se ne, tiam ili devis esti kontentaj pri la rigardo al la parolanto, kiun ili ne komprenas, same kiel tiuj, kiuj ne sufiĉe komprenis anglan, germanan, francan lingvojn, k en tiu kazo ankaŭ holandan lingvon. Krom tio, eĉ ĉe la plej bone organizitaj kongresoj, — k malgraŭ ĉiu modesto mi povas diri, ke al tiaj ankaŭ apartenas la kongresoj de I.T.F. (Internacia Transportlaborista Federacio) — troviĝas, se ili vere estas internaciaj, ĉiam iu parto da delegitoj, por kiuj pli aŭ malpli granda parto el la parolitaj vortoj restas nekomprenebla. Ĉe la kongresoj k konferencoj de I.T.F. oni oficiale tradukas en la anglan, francan, germanan, svedan aŭ danan, hispanan k italan lingvojn. Krom tio estas eble al ni prezenti raportojn pri la faritaj paroladoj en la ĉeĥa, pola k rumana lingvoj. Tio estas laŭ mia opinio pli ol ĉe iuj ajn kongresoj. Sed malgraŭ ĉiuj zorgoj k penadoj, tamen ankaŭ ĉe niaj kongresoj estas nombro da delegitoj, se ankaŭ malgranda, kiu pli malpli ne komprenas, kion oni parolas.

Pri eraroj, eĉ ĉe plej bonaj tradukoj mi jam parolis pli frue. Ĉiu, kiu havas tiurilatajn spertojn, povas rakonti pri ofte tre akraj, ĉiuokaze tempon malŝparantaj diskutoj pri *nenio*, ĉar per la tradukoj estiĝis miskomprenoj. Se oni povas tiajn miskomprenojn ankoraŭ

forigi dum la kunesto de la kongresantoj, tiam ja estas la sekvoj nur: perdo de la bona humoro, de tempo k forto. Sed al mi estas konataj kazoj, el internaciaj instancoj, kiam tiaj miskomprenoj estiĝintaj per la traduko eĉ sekviĝis tre bedaŭrindajn decidojn. Ekzistas ankoraŭ granda nombro da aliaj malfacilaĵoj...

Nenio el ĉiuj tiaj aferoj estas trovebla ĉe internacia esperantista kongreso, kie nenio perdiĝas el enhavo k ideo de la parolitaĵoj, ĉar ĉiuj rekte interkompreniĝas. Ĉiu, kiu opinias, ke intima interkompreniĝo de la diversaj popoloj estas nepra postulo en la intereso de la tuta homaro, k certe ĉiuj, kiuj estas konvinkitaj, ke reciproka kompreno inter la homoj povas servi al la internacia batalo de la laboristaro, *ne lasu senatente preterpasi kongreson, kia estas tiu de laboristaj esperantistoj.*

Pripensu, kio okazas ĉe tia esperantista kongreso k kiajn avantaĝojn povas alporti la uzado de mondhelplingvo ĉe niaj internaciaj rilatoj, ĉe nia internacia laboro. Eĉ ne unu el la ekzistantaj lingvoj donas la eblon k — idealistoj ni ja estas, sed ni feliĉe ne perdas la ĝustan juĝkapablon pri la realo —, la lernado de pli ol unu fremda lingvo estas certe neebla por la granda amaso da laboristoj, kiujn ni ja ĉiujn volas altiri por nia batalo. Kaj kiom da lingvoj ili ja devus lerni?

Esperanto jam pruvis sian uzeblon! *Per la literaturo,* originala k tradukita, *per la praktika uzado,* kiun la helplingvo jam akiris, *per la fakto,* ke ĉiam pli da instancoj de komerco, trafiko, instruo, sociaj k aliaj, ekuzas esperanton por siaj internaciaj rilatoj. Vi ĉiuj, kiuj estas pro kiaj ajn kaŭzoj pledantoj por la plibonigo de la rektaj interrilatoj inter la diversaj popoloj, informu vin pri tio, kion signifas esperanto por atingo de ĉi tiu celo k kion ĝi povas atingi tiurilate. Kaj, opiniante, ke ankaŭ vi apartenas al tiuj, kiuj kuraĝas agi konsekvence laŭ siaj opinioj, ni povas translasi la reston al via propra prijuĝo...

Tri dokumentoj.

I.

„SAT-direkcio kriegas ke CK SEU ne plenumas presadon de SAT-libroj en Moskvo.“

Por konvinkiĝi, ke ankaŭ en tio la Direkcio mensogas, aĉetu ĵus aperintan en eldono de SAT, presitan en Moskvo, luksan libron.

A. S. Puŝkin

Eŭgeno Onegin

Bele kartonita 236-paĝa volumo kun 6 ilustraĵoj sur apartaj folioj. Majstra versa traduko de N. Nekrasov.

Prezo 1 r. 75 kop.

Mendu ĉe CK SEU, Moskvo, Spiridonovka 15.“

(Reklamo aperinta en n-o 6 (101) de la „Bulteno de CK SEU“ — jaro 1931 — paĝo 46.)

II.

„8. septembro 1931.

„LITERATURA MONDO
s-ro Bleier Vilmos
Boraros Ter 6-IV-11 *Budapest*

„Est. Sam.,

„Tiu ĉi letero rilatas al la reklamo (en freŝdata n-o de via gazeto) pri la lasta SAT-eldono, presita en Moskvo: „Eŭgeno Onegin, de Pŭskin“.

„Vi scias, certe, ke ni renkontas divers-specajn barojn por transĝiri ĉu al Leipzig, ĉu al Paris, la parton (nun tre gravan) de nia Asocia kapitalo kuŝantan en Moskvo; ni do petas vin sendi la eventualan produkton de la vendo, de vi perata, al nia poŝt-ĉeka konto: LERCHNER, Leipzig, 6835...

„POR LA DIREKCIO DE SAT:
La ĝen. sekretario.“

Ilforda Kooperativa Rondo, gejunuloj en aĝo de 12—16 jaroj, dez. koresp. kun samaĝaj eksterlandoj. Respondos al ĉiuj. Skribu al K-dino E. MOON, 12 Aldborough Rd., ILFORD (Essex), Britio.

III.

„Budapest, 15. 9. 1931.

„Al la direkcio
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Paris

„Est. Sam. Responde al via letero de 8.n.m. ni kun bedaŭro sciigas vin, ke la menciitan produkton de la vendo de Eŭgeno Onegin ni ne povas transsendi al via kaso, ĉar la reklamatajn librojn ni ricevis de CK SEU interŝanĝe por niaj eldonaĵoj, kiujn ni jam liveris al Moskvo.“

„Kun sinceraj salutoj
„LITERATURA MONDO-ELDONEJO.“

*

Longan komenton ni ne volas fari. La dokumentoj ja parolas sufiĉe klare. Ni nur altiru la atenton de la Legantaro al tiu fakto, ke niaj Sovetiaj K-doj, kiuj ne povas ricevi „S-ulo“n, estas cinike trompataj k eble bonkrede pensas, ke CK de SEU faras ĉion eblan por likvidi sian ŝuldon al SAT. Fakto estas, ke tiu „SAT-eldonaĵo“, kies nur **22** ekz-oj estis sendataj al nia Administracio, estas uzata por interŝanĝe ricevi neŭtralajn eldonaĵojn.

Samokaze ni aldonu, por konvinki la obstinajn kredemulojn, kiuj ne volas konsenti al tio, ke CK de SEU estas raba organizo, kiu celas detrui SAT-on per ĉiaj — eĉ la plej abomenaj — rimedoj, ke laŭ interkonsento de la filio de la Berlina *Neudrag* en Moskvo la mono en *rubloj* povis esti elpagata al ĉi tiu instituto mem, k tiu simpla transpago en Moskvo ne okazis; *Neudrag* ja siatempe informis nin, ke ĝiaj klopodoj malsukcesis.

Tiaj estas la faktoj, k nur blinduloj ne povas vidi ilin.

Sed la fripona, la raba agado de CK de SEU ne atingos sian celon. SAT vivos!...

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Svedio: *Kiruna.* Tie ĉi, en la plej norda sveda urbo, en norda Laponio, jam estas proksimume 250 esp-istoj. La 6. sept. okazis en la loka kinejo publika parolado pri esp-o de la prezidanto de l'loka Laborista Kleriga Asocio K-do Bengtson k poste okazis publika provleciono laŭ rekta metodo de estona K-do N. Ruus (15428). Partoprenis ĉ. 250 person. Dum la 7.—12. sept. estis malfermataj diversaj esp. kursoj, rekt-metodaj, gvidataj de K-do Ruus. Laŭ la aranĝo de la urba lerneja estraro estas aranĝataj 2 specialaj grupoj por lernantoj en la lastaj klasoj de popollernejoj. Deziris partopreni la kursojn pli ol 200 geknaboj, sed allasataj estis al la kursoj (pro manko da loko) nur 75 geknaboj. Por la ministoj, kiuj devas labori posttagmeze k tial ne povas partopreni la vesperajn kursojn, estas aranĝata speciala matena grupo. La Lab. Kleriga Asocio ebligis ankaŭ al senlaboruloj lerni esp-on senpage en speciala grupo antaŭtagmeza. La bona eblo estis uzata. Por komencantoj funkcias ankoraŭ 3 vesperaj grupoj, sume kun pli ol 100 p. k krome estas gvidata de K-do Ruus unu daŭriga kurso (ankaŭ kompreneble rekt-metoda, ĉar la kursgvidanto ne konas la lokan lingvon). Estonio: *Tallinn.* La 9. sept. estis fondita Junsocialista Esp.-Klubo de Tallinn kun kelkdek membroj. Ĝia adreso: P. K. 367. La membroj de la klubo dividis inter si la per-esp-an laboron. Ekzistas speciala persono, kiu prizorgas la tradukojn el „S-ulo“ por la loka socialista gazeto, ktp. La klubkunvenoj okazos regule ĉiusemajne.

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo“:

The Los Angeles Citizen, 28. 8., el Finl. (354); 4. 9., infanoj kantis esp-e (357/58); *Rahva Sona,* Tallinn, 26. 8., „Laboristoj“ de Nadir (L.L. n-o 8), 27. 8., malsukc. rekl. de faŝismo (357/58), 10. 9., esp. ĉe Viena olimpiado, 9. 9., Lingva ĥaoso ĉe kongr. (360).

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Ostthürg. Volksztg., Altenburg, 21. 8.; *Rahva Sona,* Tallinn, 23. 8.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Der Straßenbahner-Sportler, Nürnb., aŭg.; *Signalen,* Stokh. 17. 9.

En la hindoĉinaj indiĝenlingvaj gazetoj „Ngo-Bao“ (Hanoi) de 12. 8. k „Trung-Bao Tan Van“ (Hanoi) de 12. 8. troviĝas bildo de la peresp-a ĉirkaŭmond-biciklisto *Perer* (Peraire) kun aparta atentiga artikolo, sur la unua paĝo. Bona propagando!

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

BRITIO

Angla grupo dez. intergrupan koresp-adon kun alilandaj grupoj. Adr.: O. G. Groves, 43 Goodale st. *Derby.*

GERMANIO

K-do F. Peschke, *Ottendorf/Sächs. Schweiz,* kêl, pri ĉ. temoj, L, PK, PM. Certe resp.

LEA-grupo koresp. kun grupoj k rondoj pri ekonomiaj temoj kêl. Adr.: LEA-grupo, Wilhelminenstr. 28, *Rüsselsheim/M.*

ENHAVO

	paĝo
La fundamento de l'kapitalismo ŝanceliĝas	9—10
La faŝista ribelprovo en Aŭstrio	10—11
El Latvio	11
Letero el Usono al „S-ulo“ k la SAT-anaro	11
La manifesto de la britaj maristoj	12
Pri la kvinjara plano	12—13
La klasbatalo tra la mondo	13—14
Forigu la burĝajn sensencaĵojn	14
Diskutejo	14—16
Scienco k tekniko	16

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)